# Esperanto en Danio

10-a jarkolekto 4/2003



Junulargastejo de Aalborg,
kunvenejo de la DEA-jarkunveno 2004

**Esperanto en Danio**
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

**Adreso de la asocio/prezidanto:**
Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16
🖂 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 805 7370
UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Bent Wiinberg (vicprezidanto)
Ina Schultz (kasisto)
Jytte Sunekær (sekretario)
Ole Blaust
Werner Madsen
Torben Svendsen

**Anstataŭantoj:**
Bent Jensenius
Ana Røssum

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 24 47 50 40
🖂 eed@esperanto.dk

**Presado:**
Atlas-Quick

**Adresŝanĝoj al:**
Ina Schultz
Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup
☎ 32 52 19 58.
🖂 ina.schultz@get2net.dk

**Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.**

**Limdato por la venonta numero: 10.01.2004**

# Enhavo

**Karaj legantoj!** ........................ **4**

## Lande

**Mogens Groth 90-jara** ............ **5**
**El la bretaro de la Libroservo** **6**
**La hejmpaĝo de DEA** ............ **7**
**Forpaso** ................................ **8**
**Hobio kontraŭ la familia vivo** . **9**

## Loke

**Kopenhago** ........................... **11**
**Næstved** ............................... **15**
**Århus** ................................... **16**
**Aalborg** ................................ **16**

## Monde

**Urbestrino kun esperantistoj** **17**
**Protesto de Radikaluloj** ......... **18**
**Centjara datreveno** ............... **18**
**Membriĝo en UEA / TEJO** ... **20**
**EEU-kongreso en Bilbao** ...... **22**
**Printempo en Pollando** .......... **24**
**Impresoj pri BET-39** ............. **25**
**Pasporta Servo** ...................... **26**

**Invito al Zamenhof-vespero** .. **27**
**Salutoj** ................................... **28**

# La sekva jarkunveno de Dana Esperanto-Asocio

okazos

**la 24an kaj 25an de aprilo 2004**
en la kunvenejo de
**Aalborg Vandrerhjem**
Skydebanevej 50
9000 Aalborg.

La kunvenejo/loĝejo situas ĉe la marbordo, nur 3,5 km de la centro de Aalborg, de kie foriras aŭtobuso ĉiun duonhoron de frua mateno ĝis tagfino.

Bonvolu rezervi la tagojn !

Detala programo kaj aliĝilo sekvos en la venonta numero de *Esperanto en Danio*.

# Karaj legantoj!

Kelkajn problemetojn ni havis de kiam ni lastfoje vidis unu la alian! Malsaniĝis nia prezidanto dum familia vizito en Italio – ŝi devis urĝe revojaĝi por resaniĝi en la apudhejma hospitalo (kiu hazarde situas ĝuste en Italiensvej sur Amager). Ŝi nun resaniĝis, sed baldaŭ devos submetiĝi al operacio. Bonŝanon, Ileana!

Malpli grave, sed tamen ĝene, estas la multaj eraroj en la Adresaro kiun ni elsendis kun la lasta numero de Esperanto en Danio. Ni petas vin fari jenajn ĝustigojn:

- La prezidanto havas ankaŭ poŝtelefonan numeron: **2448 3298**.
- La ĝusta retpoŝta adreso de la vicprezidanto estas: **teo@post11.tele.dk**.
- Arne Casper ne plu estas revizoro, ĉar li ne rajtus samtempe gvidi la Libroservon. Anstataŭas lin **Jacob Nordfalk, Overbys Allé 26,1., 2500 Valby, ☎2620 6512, ✉ nordfalk@mobilixnet.dk**.
- La alia revizoro, Lis Thune, kiu ankaŭ reprezentas la ekzamenan komisionon, havas retpoŝton: **thuga@mobilixnet.dk**.
- La ĝusta retpoŝta adreso de la revuservo estas: **frederikeriksen@post.cybercity.dk**.
- La ĝusta telefonnumero de Esperanto-nyt estas **9813 4040**.

Mi eĉ sukcesis meti malĝustan telefonnumeron anstataŭ mian en la kolofono de la lasta numero, sed espereble tio estas ĝustigita en la nuna!

Sed ankaŭ estas feliĉaj novaĵoj: pli kaj pli da homoj sendas kontribuojn al EeD. Ĉi tiu numero certe dum kelka tempo tenos rekordon tiurilate, ĉar Arne Casper igis ĉiun partopreninton de progresiga kurso sendi saluton al vi (vidu dorsflanke de la revuo), sed vi vidos ke ni ankaŭ havas aliajn "gastaŭtorojn" ĉi-foje. Ĉu tio eble estus io por vi ankaŭ? Ne timu ke oni forĵetos aŭ tranĉos vian kontribuon – tio nur signifos ke la dana Esperanto-aktiveco fine atingis kontentigan nivelon…

*Jens S. Larsen*

# Lande

## Mogens Groth 90-jara (27an de oktrobro 2003)



La nomon ”Mogens Groth” konas preskaŭ ĉiuj danaj esperantistoj, aŭ – kiel li mem preferas diri – esperanto-parolantoj, kaj multaj dise en la mondo. Dum la jaroj multnombraj homoj ekkonis kaj eklernis ”La Internacian Lingvon” pere de li. Li gvidis plurajn kursojn diversnivelajn, kaj li ĉiam estis preta instrui – se dezirite – dum Esperanto-aranĝoj. Kiam tio fariĝis la sola ebleco, li instruis hejme en sia agrabla apartamento, kie li loĝas, siatempe kun sia same inspira edzino, Else Forsberg, kiu ankaŭ parolis Esperanton. La Dana Esperanto-Ekzamena Komisiono, en kiu li estas membro, plurfoje okazigis la ekzamenojn en lia tiucele tre taŭga hejmo.

Mogens esperantistiĝis jam en 1942, do antaŭ 61 jaroj. Li neniam ĉesas instrui kaj studi la lingvon. Lia preferata studobjekto estas la danaj Esperanto-pioniroj, ekzemple Petra Nielsen de Kolding, kaj Magrethe Noll, sed precipe la sudjutlandano Christian Nielsen, kiu verkis la unuan danan Esperanto-lernolibron, aperintan jam en 1890.

Mi ekkonis Mogens Groth en 1958, kiam mi translokiĝis al Kopenhago kaj tie aliĝis al la Komuna Konversacia Klubo (KKK). Iun vesperon Mogens prelegis. Poste ni interparolis, mi balbute, ĉar mi ankoraŭ nur tiel parolis la lingvon. Mogens tuj proponis sian helpon: Mi ĉiutage dum dek minutoj telefone konversaciu kun li en Esperanto. Pacience li eltenis mian balbutadon,  kiu iom post iom fariĝis pli flua konversacio. De tiam Mogens estas mia pacienca instruanto, lojala kunlaboranto, kuraĝiga instiganto kaj bona kaj inspira amiko.

Estante muzikisto Mogens laboradis vespere kaj nokte en multaj diversaj lokoj. Tiam li dumtage vizitis la urbajn bibliotekojn por studi, kaj li ĉiam kunportis siajn plenajn gramatikon kaj vortaron. Hejme li iom post iom kolektis tre riĉan kaj ampleksan Esperanto-

bibliotekon. Li amas la poezion same arde kiel la muzikon, kaj ofte vizitantoj en lia hejmo aŭkultis klasikan muzikon aŭ voĉlegadon de poemoj, esperantaj aŭ danaj. En lia gastama hejmo multaj eksterlandaj esperantistoj trovis agrablan tranoktejon

Mogens jam frue aliĝis al la Dana Laborista Esperanto-Asocio kaj al SAT. Inter la membroj de DLEA troviĝis personoj kiel Poul Thorsen, Paul Neergaard kaj pluraj aliaj internacie gravaj esperantistoj. Kun sia ”sangofrato” Ferenc Szilágyi li dum multaj jaroj intense kunlaboris pri la tiam konata kaj ŝatata kultur-revuo ”Norda Prismo”. Ĝi dum ĝiaj lastaj jaroj estis prizorgata de grupo da Kopenhagaj esperantistoj. Mogens tre energie gvidis tiun laboron.

Ne estas eble en limigita spaco tuŝi ĉiun faceton de la homo Mogens Groth. Li  estis kaj estas unu el la signifoplenaj vivigantoj de Esperanto. Koran gratulon al li pro la 90 jaroj kaj varmajn dezirojn por li en la  estonteco. Lia kapablo krei geamikecojn verŝajne estas bazita de lia talento  veki la senton en ĝuste tiu homo, kiu momente sidas antaŭ li, ke li/ŝi estas speciale unika.

*Lis Thune*

# El la bretaro de la Libroservo

Post translokiĝo el Vester Voldgade al Amager, denove plenforte la Libroservo de DEA pretas servi al vi!

Ni vere havas multajn librojn – pli ol 3.000 – kion ni povis senti dum la transportado, sed feliĉe bonaj amikoj inter samideanoj pretis helpi.

Ni celas plej baldaŭ listigi la librojn en la hejmpaĝo de DEA, tiel ke vi povos mendi ilin tie. Tamen ni intencas ankaŭ prezenti titolojn de elektitaj libroj ĉi tie en *Esperanto en Danio* por servi al klientoj, kiuj ne havas komputilon.

La cititajn titolojn ni rabatas je 10 procentoj ĝis la venonta eldono de *Esperanto en Danio.* Bonvolu mendi ĉe arne-casper@email.dk aŭ per la telefonaj numeroj 3920 6348 aŭ 2140 8487.

Titoloj de ĉi tiu numero:

| | |
|---|---|
| Infanoj en la mondo, UNICEF | kr. 35,00 |
| La spleno de Parizo, Charles Baudelaire, 1967 | kr. 75,00 |
| Virino ĉe la landlimo, Majorie Boulton, 1958 | kr. 50,00 |
| Masto de l'Ringoj , R.R.R. Tolkien, 1997, 3 volumoj po | kr. 195,00 |

*Arne Casper*

# Informoj pri la hejmpaĝo de DEA

La oficiala hejmpaĝo de DEA www.esperanto.dk iam troviĝis ĉe la dana interreta provizanto (Internetudbyder) *DK-Net*. Tiun poste aĉetis la entrepreno *Tele Danmark Internet* (nun *TDC)*. La kondiĉoj por la pago kaj uzado de la hejmpaĝo www.esperanto.dk ĉe TDC estis neklaraj, kaj ofertis en praktiko tro malkontigajn servojn (persone kaj teknike) por la nuna estraro de DEA. Necesis do trovi novan pli bonan solvon, kiu samtempe estu ekonomie akceptebla por DEA. Inter pluraj ni fine trovis kaj elektis *WEB Hosting*, ĉar ĝi plenumis niajn postulojn – kaj nia hejmpaĝo estis translokita al WEB Hosting meze de julio 2003.

La hejmpaĝo de DEA estas krompromiso inter pluraj teknikaj kaj homaj faktoroj. Ni deziras ke ĝi funkciu teknike rapide, altnivele kaj sekure, sed samtempe ankaŭ tiel simple ke ĉiu ordinara membro de DEA, per simpla Windows redaktila programo (ekzemple Front-Page), kapablu prizorgi kaj aktualigi la hejmpaĝon de DEA. Por specialaj projektoj (ekzemple konstruo de serĉebla datumbazo de libroj kaj alia funkcia programado) ni do konsultos hejmpaĝajn specialistojn kaj programistojn.

Laŭ la informstrategio aprobita de la estraro de DEA (vidu EeD 3/2003), la hejmpaĝo estu aktuala, simpla, plaĉa kaj dinamika, kaj estu asignita al ĉefrepondeculo, sed volonte kunlabore kun aliaj membroj de DEA. Kun la junulo Gorm mi komencis la laboron renovigi kaj ĝisdatigi unue la enir-paĝon, sed ankaŭ iom la ceterajn paĝojn. Temas pri nerapida procezo, kiu ankaŭ signifas, ke ni bezonas novajn inform-tekstojn, priskribojn de la lokaj asocioj, kluboj kaj grupoj ktp., unue en la dana, sed certe ankaŭ en Esperanto. Ni tial petas de vi paciencon – ĉar ni estas bone survoje en la laborprocezo, sed tamen ankoraŭ mankas pluraj elementoj antaŭ ol ni povos prezenti la paĝojn al membroj kaj la ĝenerala interreta publiko.

Sekve de la nova informstrategio, la grupoj kaj kluboj ne plu povas mem enŝuti (upload) informojn al la hejmpaĝo www.-esperanto.dk, sed necesas sendi ilin al la interreta respondeca estrarano, kiu tiam enmetos la koncernajn informojn al hejmpaĝo.

Pro tio la muzikgrupo Esperanto Desperado decidis trovi propran interretan provizanton, por pli rapide mem ĝisdatigi sian proprajn dosierojn (filer). Kelkaj personoj en DEA promesis per unufoja monsumo helpi al Esperanto Desperado.

Intertempe mi kompreneble daŭre aktualigas la ekzistantajn paĝojn de DEA – kaj petas la membrojn sendi informojn (en la dana kaj esperanto) pri novaj kunven-datoj, priskriboj de la kluboj ktp. La ĉi-malsupra tabelo (nur fragmento de la ampleksa statistika servo), multe dokumentas pri la aktiva utiligo de nia hejmpaĝo, sed kompreneble malmulte dokumentas pri la kvalito de niaj paĝoj.

*Torben Svendsen, webmaster@esperanto.dk*

| Monataj sumoj pri nombro da vizitantoj, uzataj paĝoj, dosieroj | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Monato | Taga meznombro | | | | Entute dum monato | | | | | |
| | Trafoj | Dosieroj | Paĝoj | Vizitoj | Retejoj | Kilo-Bajtoj | Vizitoj | Paĝoj | Dosieroj | Trafoj |
| Okt 2003 | 758 | 545 | 183 | 99 | 904 | 221 576 | 1 196 | 2 202 | 6 548 | 9 101 |
| Sep 2003 | 803 | 555 | 230 | 101 | 1833 | 516 264 | 3 057 | 6 901 | 16 655 | 24 103 |
| Aŭg 2003 | 804 | 529 | 217 | 89 | 1801 | 550 255 | 2 773 | 6 753 | 16 427 | 24 949 |
| Jul 2003 | 627 | 294 | 180 | 81 | 932 | 72 695 | 1 380 | 3 062 | 5 010 | 10 672 |
| Entute de 15. 07 - 12.10. 2003: | | | | | | 1 360 790 | 8 406 | 18 918 | 446 | |

# Forpaso

Julie K. Hansen, Holbæk, mortis en aprilo. Ŝia edzo estis la aktiva, entuziasma Engelbreckt. La paro havis multajn plezurajn travivaĵojn pere de Esperanto – partoprenis en kongresoj. La familio helpis Lorens Friis aranĝi someran kurson, kio estis malfacila tasko en la jaro 1944 pro la milito – en migrula hejmo en Holbæk. Nun ankaŭ Julie ripozu en paco.

*Jytte Sunekær*

# Hobio kontraŭ la familia vivo

Antaŭ dek jaroj mi legis la danlingvan libron "X – en komplet indføring i Martinus kosmologi" de Per Bruus Jensen. Legante la libron impresis min la aserto de la dana verkisto Martinus, ke la futura internacia kumuna lingvo jam eksistas kaj tiu lingvo estas Esperanto. La verkisto en tiu libro ankaŭ asertas, ke eblas priskribi la gramatikon de Esperanto sur ununura paĝo. Tio vekis mian intereson pri Esperanto.

En kopenhaga strato en 1997 mi ekvidis simplan afiŝon kun la teksto "Esperanto" kaj la telefonnumero de la tiama prezidanto de DEA, Kim Henriksen. Kontaktinte lin, mi komencis fari la 60-lecionan leteran kurson de Dansk Esperanto-Institut kaj samtempe kelkajn kursojn en la kopenhaga klubo KEK.

La lernado de Esperanto postulas multe da tempo. Ĉiusemajne mi vidas novajn vortradikojn, kiuj postulas studadon de vortaroj. Mi ankaŭ dubas pri la aserto, ke Esperanto estas facile lernebla kiam mi foliumas en *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* de K. Kalocsay kaj G. Waringhien aŭ en *Materialoj pri la nuna uzado de la akuzativo* de Daniel Moirand. Cetere mi ankoraŭ ne kapablas uzi la prepozicion po. Esperanto estas regula kaj pli facile lernebla ol aliaj lingvoj, sed por mi estas tre malfacile uzi tiun lingvon korekte. Legante kaj skribante mi daŭre strebas plibonigi miajn lingvajn spertojn [kaj ne malsukcesas – *ndlr].*

Por buŝe praktiki la lingvon kaj fari diversajn servojn mi estas membro de la loka klubo KEK kaj partoprenas preskaŭ ĉiusemajne la lundan klubkunvenon. Ekde 2002 mi estas vicprezidanto de KEK. La antaŭan jaron mi fariĝis membro de la estraro de Esperanto-Domo. Ni KEK-anoj havas kunvenojn kune kun la DEFA-klubanoj, kaj tiuj kunvenoj estas amuzaj, lernoriĉaj kaj laborpostulaj.

Por mi estas tre grave ke la esperanta organizo kaj ĝiaj servoj funkciu. Tial mi ankaŭ en 2001 laŭ peto de Kaj Røssum kaj spite de mia malsufiĉa lingvokono transprenis la ĉefdelegitan oficon por UEA en Danio. En tiu ofico mi peradas kotizojn de la individuaj

UEA-membroj al UEA kaj faras respondojn al eksterlandanoj sekve de informpetoj pri danaj rilatoj.

"Soldatoj de Tordenskjold" ankaŭ ekzistas en Esperantujo kaj tia mi estas, ĉar mi ankaŭ ekde 2002 estas vicprezidanto de la estraro de la landa organizo DEA. Ĝis nun mi prenis nur malpezajn taskojn en tiu posteno.

Sume, kiel pluraj aliaj esperantistoj, mi uzas multe da tempo por ĝui kaj servi Esperantujon. Tiu temporaba hobio konkuras kun la familia vivo. Laŭ mia observado la plejparto de la aktivaj membroj havas aŭ samideanan geedzon aŭ tute neniun. Hejme mi mem sentas la ĵaluzon de mia edzino pri miaj esperanto-aktivecoj kaj ŝiajn kvazaŭ alergiajn reagojn, se mi sidas tro longe ĉe la komputilo legante kaj respondante retleterojn. Pro tio mi maltrankviliĝas kaj konstante cerbumas por elekti tiujn aktivecojn, kiuj nepras.

Mi ĝojas nun, ĉar estas du geedzaj paroj inter la komencantaj lernantoj de la Esperanto-kursoj en Vasbygade. Mi kredas, ke tiaj lernantoj havas la plej bonan ŝancon fariĝi esperantistoj, ĉar kune ili kapablas havi familian vivon ene de Esperantujo.

*Bent Wiinberg*



*La kursanoj de Ruds Vedby, fotitaj de Arne Casper.*
*Vidu dorsflanke de ĉi tiu numero.*

# Loke

## Kopenhago

La kluboj KEK kaj DEFA-Kopenhago kunvenas en *Banestyrelsen, Vasbygade 10,* ĉiun lundon. Unufoje monate estas komuna manĝo kaj librovendado ekde la 18.30 (buterpanoj mendeblaj ĉe Ruth, tel.: 3646 6279). Kuntaktuloj: KEK ĉe Jytte Sunekær, ☎ 4448 4726, 🖂 jytte.sunekaer@mail.tele.dk – DEFA ĉe Astrid Birkbak, ☎ 4497 4329.

Ĉiulunde funkcias kurso por komencantoj (gvidata de Bent J.) kaj daŭrigantoj (Amir H.), kaj estas ankaŭ studgrupo je aplika nivelo. Ĝi nun studas parte H.C. Andersen; li 200-jariĝos en 2005, kaj oni tradukas fabelojn de li. La ceteran tempon oni studas laŭ "Vojaĝo en Esperanto-lando" de Boris Kolker. Informoj ĉe *Lene Niemann* kaj *Bent Wiinberg.* La grupo funkcias ĉiun duan lundon (alterne kun programoj) je horo 20.00–20.45 kaj 21.00–21.45. – Cetere oni klopodos daŭrigi la kursojn por komencantoj kaj daŭrigantoj ankaŭ venontjare.

La Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo (KEKG) kunvenas unufoje monate en la lokaloj de *Danasvej 30B,* en la dua etaĝo maldekstre, fine de la koridoro. La pordoj estas malfermitaj inter 19.00–23.00, kaj prelegoj okazas inter inter 19.30–20.30.

### Okazos:

**Novembro 2003**

KEK/DEFA lunde, 03.11: je 18.30 komuna manĝado kaj librovendado. Poste Astrid kaj Erik distros 'per, pri kaj kun' *La bapto de Caro Vladimir.*

KEKG ĵaŭde, 13.11: *'Zinaan Ek' – iom da astronomio kaj stelfolkloro pri la konstelacio de 'Skorpio'.* Prelego de Mogens Rude Andersen, baznivela kun ampleksa ilustra materialo.

KEK/DEFA lunde, 17.11: Numerludo.

**Decembro 2003**

KEK/DEFA lunde, 01.12: komuna manĝado kaj librovendado. Kunportu objekton kaj rakontu pri ĝi.

KEKG merkrede, 03.12: *Mia vivo en Belgio i.a. kiel interpretisto en Bruselo.* Prelego de Eliza Kehlet. – **NB:** ŝanĝo de la antaŭe publikigita programo!

KEK/DEFA lunde, 08.12: post granda sukceso 6/10, Bent denove ludigos nin.

KEKG sabate, 13.12: **Zamenhofvespero**. Vidu la anoncon fine de ĉi tiu numero de la revuo.

KEK/DEFA lunde, 15.12 je **19.00: Julmiko.** Aliĝo necesa plej malfrue la 9an de decembro ĉe Karen, tel. 5572 7377. La menuo: 3 pecetoj da buterpano, fromaĝkuko kaj kafo por 40 kr. Trinkaĵoj je moderaj prezoj.

**Januaro 2004**

KEK/DEFA lunde, 05.01.04: Komuna manĝado kaj librovendado. Studgrupoj.

KEK/DEFA lunde, 12.01.04: Programo ankoraŭ ne fiksita.

KEKG, merkrede 14.01.04: Programo ankoraŭ ne fiksita.

## Okazis:

En KEK ni spektis vidbendigitajn televidelsendojn faritaj en 1994 kunlabore kun Øernes TV. Multajn saĝajn klarigojn pri Esperanto kaj la movado ni aŭdis. En tiuj elsendoj Jens S. Larsen agis kiel ĵurnalisto. Li faris bonajn demandojn.

Pri la kongreso en Gotenburgo ni tri fojojn okupiĝis. Hejmenvojaĝantaj eksterlandanoj sin prezentis. – La unuaj impresoj estis temo al kiu pluraj kontribuis kun tre diversaj travivaĵoj. Fine nia UEA-komitatano, Ileana Schrøder, raportis. La Brusela Komunikadcentro estis unu el la temoj, ĉu ĝi ekonomie pluvivos. Jens raportis pri la kongresa temo. En la reto ni legis, kiom multe li kaptis el la lingva simpozio, postkongresa. Bent Jensenius faris dialogon kun svisa paro, ferianta en Kopenhago.

Ni sukcesis starigi porkomencantan kaj pordaŭrigantan kurson – provizore por la aŭtuno.

*Jytte Sunekær / Bent Jensenius*

## Debatvespero

La 10an de septembro KEKG okazigis debaton pri "Komunaj taskoj kaj problemoj en la dana Esperanto-Movado". Unue parolis DEA-prezidantino Ileana Schrøder, kiu akcentis la neceson plifortigi la Movadon nialande. Sekve, UEA-ĉefdelegito Bent Wiinberg informis interalie ke Danio estas tiu skandinavia lando kiu havas proporcie plej malmulte da individuaj membroj de UEA; la nombro estas malpli ol duono de la sveda kompare al la loĝantaro. Tiam Lis Thune parolis pri la neceso de kompetento kaj entuziasmo ĉe la individuaj agantoj. La enkondukajn paroladetojn finis Torben Svendsen, rakontante pri la bona sperto okupiĝi pri aliaj temoj ol la strikte organizaj, kaj rekomendante atenti pri la pli malmultekostaj anoncejoj (ekzemple *Universitetsavisen,* kiun ricevas aŭtomate ĉiuj kopenhagaj universitataj instruistoj kaj studentoj).

Poste estis ankaŭ diskuto, sed la tuta vespero eble estis valora pli informe kaj idee ol efektive debate.

*Jens S. Larsen*

## Esperanta koncerto

La 3an de oktobro Esperanto Desperado koncertis kune kun alia grupo PLONK en Nørrebro. Mi per la reto trovis la plej bonan vojon tien – eĉ pri 5 zona tondbileto mi informiĝis. Busveturante mi sekvis la haltejojn por eliri ĝustaloke.

Kim, kiu gvidis, sin movis inter la multaj objektoj sen renversi ion. Amir rave kantis, Helle Eble rave flutis – ĉiuj liveris altkvalitan varon. Kelkfoje ili preterpase menciis Esperanton. La ĉeestantoj havis ĉ. 30 jarojn. Mi estis la plej aĝa. Sed mi ne sentis min sola.

*Jytte Sunekær*

## “La ekesto de la homo”

La 20an de novembro (du semajnojn post la origina plano) Jens Stengaard Larsen faris interesan prelegon pri “La ekesto de la homo”.

Mi pensis ke mi ja ĝenerale scias pri paleontologio kaj la evoluo de la homo: la tero ekestis antaŭ 4,5 miliardoj da jaroj, vivo antaŭ 4 miliardoj da jaroj, mamuloj antaŭ 200 milionoj da jaroj, la homsimioj antaŭ 25 milionoj da jaroj kaj ni homoj antaŭ nur 130 mil jaroj.

Tamen mi surpriziĝis, ĉar dum la pasintaj jaroj tiu scienco multe evoluis. La scienco ne plu tiom baziĝas sur analizado de ostoj (riska tekniko ĉar la ostoj de sama specio povas esti tre malsamaj depende de la sekso kaj aĝo de la individuo).

Anstataŭe oni pli kaj pli uzas molekulajn teknikojn, kiel analizadon de DNA. La pli granda parto de nia DNA estas mikso de la patrina kaj patra heredo, sed fakte ekzistas parto kiu venas senŝanĝe de la patrino (la t.n. mitokondria DNA). El tiu parto, kiun influas nur mutaciiĝoj, oni povas vidi kiom malsamaj estas du la analizataj homoj. La malsameco de la genoj estas plej granda en Afriko, tiel ke la unuaj homoj tre verŝajne loĝis tie.

Fine Jens konkludis la prelegon per eta bombo: Ĉiuj niaj lingvoj estas preskaŭ samaj, ekzistas kvazaŭ nur unu lingvo. Krome lingvo ne ekzistas por komuniki inter homoj, sed por ke ĉiu homo povu esprimi sian internan vivon.

Unue mi ege kontraŭis tiun vidpunkton, sed post iom da pripensado mi rekonis ke ekzemple la lingvo de hundoj (bojado kaj pozicio de vosto kaj oreloj) estas fakte tia: nur unu lingvo (almenaŭ por mi) kaj por ke la hundo povu esprimi sian internan vivon, sendepende de tio ĉu iuj aliaj hundoj rigardas.

Ĉi-matene mi kaptis min parolanta al mi mem... Ĉu tiel mi farus se mia lingvo nur ekzistus por komuniki al aliaj homoj?

*Jacob Nordfalk*

# Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Fyrrevænget 4, 4700 Næstved, tel 5572 1240, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk. La kunvenoj okazas en *Grønnegades Kaserne, Grønnegade 10, lokalo 111,* ekde 19.30.

**Okazos:**

Vendrede 24.10: Sisse Gry Olsen rakontos en la dana pri sia laboro inter stratinfanoj en Bolivio. La aranĝon ni anoncos al la ĝenerala publiko en la lokaj medioj.

Vendrede 31.10: Traduklaboro pri H.C. Andersen. Ni prilaboros la fabelon: La ŝtormo translokas ŝildojn.

Vendrede 14.11: Traduklaboro pri HCA.

Vendrede 21.11: Traduklaboro pri HCA aŭ prelego. Traktoj pri tio ne finiĝis.

Vendrede 28.11: Prelego aŭ traduklaboro pri HCA.

Vendrede 12.12: Kristnaska aranĝo.

**Okazis:**

26.09: Ni kun vervo kaj intereso komencis la laboron pri esperantlingva traduko/reverko de unu el la fabeloj de Andersen, kaj kvankam iuj eble opinias, ke ni kun nia modera – aŭ eble mankanta – arta kapablo entute sukcesos, ni ne deziras maltrafi la okazon provi pliampleksigi la kvanton de Andersen-fabeloj en Esperanto.
Daŭrigon de tiu laboro okazis la 3an de oktobro, ĉar la malsano de la DEA-prezidanto subite ŝanĝis la programon.

10.10: Ne tre multaj ĉeestis, sed ni rakontis pri someraj travivaĵoj, kaj Karen instruis al ni nomojn de diversaj arboj, plejparte de ŝia propra ĝardeno. Poste ŝi ekzamenis nian scion pri la temo.

*E. Henning Olsen*

# Århus

Prezidanto: Stanisław Mielczarek, Skovgårdsvænget 125, 8310 Tranbjerg J. Tel./fakso: 8629 2306, retpoŝto: stanis@psy.au.dk.
Kunvenejo: Senior-Centret, Østergade 30, 2., 8000 Århus C.
Kunvenoj: je la 19.30 h.
**Okazos:**
**30.10: Ileana Schrøder**, la nova prezidantino de Dana Esperanto-Asocio vizitos nian klubon! Venu, do, por ekkoni la prezidantinon, ŝiajn planojn pri Esperanto-movado en Danlando ktp. Ĉi-vespere ni havos ankaŭ eblecon por esprimi niajn opiniojn, dezirojn pri E-movado en nia lando, doni konsilojn ktp.
27.11: Kio (kiu?) instigis vin lerni Esperanton, kaj ĉu vi kredas je ĝia estonteco?
11.12: Zamenhof-festo. Rimarku! La kunveno komenciĝos je la 19.00 horo!

**Okazis:**
25.09: "Mia ferio" estis la temo de nia unua kunveno post la varma somero 2003. Ĉiu el ni rakontis pri sia ferio. Montriĝis, ke ni feriis en diversaj lokoj de la mondo, ekz. en Francujo, Turkujo, Kroatujo kaj Danlando. Kelkaj el ni partoprenis kompreneble en la UEA-kongreso en la najbara Svedujo.

*Stanisław Mielczarek*

# Aalborg

**29.10, je la 19a: Ileana Schrøder** vizitos nin. Venu kaj renkontu nian prezidantinon kaj aŭdu pri la planoj por la Esperanto-movado en Danio ktp. La klubo regalos vin per kafo, teo kaj kuketoj.
**3.12, je la 19a: Jonas kaj Mathias Dalmose** muzikos kaj rakontos al ni pri tio kial estis bone por ili lerni kaj studi Esperanton.
Ambaŭ kunvenoj okazos en Christiansgade 38, 1. Aalborg. Bonvolu telefoni antaŭe, se vi povas veni: **98 13 40 40**.

*Ejnar Hjorth*

# Monde

## La urbestrino de Zagrebo kun esperantistoj

Vicministro pri kulturo D-rino Biserka Cvjetičanin kaj urbestrino de la urbo Zagrebo Vlasta Pavić kune malfermis la ekspozicion de dana skulptisto Jesper Neergaard en la prestiĝa kroata Muzeo Mimara la 9an de septembro. Jesper Neergaard donacis en 2001 sian skulptaĵon "La Futuro" al Zagrebo dum la 86a Universala Kongreso.

Ĉi-jare Kroata Esperanto-Ligo ricevis financan helpon por pli profunde prezenti la artiston al la zagreba artama publiko. Neergaard ekspozicias 27 skulptaĵojn sub la nomo "La ŝtono de la filozofo". Kroata Esperanto-Ligo ricevos de la skulptisto unu skulptaĵon donace por siaj novaj ejoj.


La skulptisto restis en Kroatio dum du semajnoj kaj laboris per la kroata ŝtono en iu vilaĝa ŝtonlaborejo. Krome li havis apartajn laborsesiojn kun blindaj infanoj.

Per la ekspozicio Kroata Esperanto-Ligo konfirmas sian pozicion de kultura asocio en Kroatio.

Muzeo Mimara okaze de la ekspozicio eldonis prospekton pri Neergaard kun Esperanto kiel unu el la lingvoj.

Ĵurnaloj kaj televido raportis pri la agado de esperantistoj lige al skulptarto.

*Spomenka Štimec en [landa-agado]*




*"La Futuro" desegnita de Helen Claesson*

# Protesto de Radikaluloj

Giorgio Pagano, sekretario de la Esperanto Radikala Asocio, malsatstrikis dum 18 tagoj proteste al promesrompoj. La itala ministrino pri instruado Leticia Morati akceptos delegacion de la Radikala Partio je la 23a de oktobro.

Dum la lastaj kvar monatoj, Radikala Partio petadis rendevuon kun s-ino Morati, por ke ŝi klarigu kial la iniciatoj koncernantaj lingvan demokration ene de Euxropa Unio – kaj interkonsentitaj kun ŝia ministerio – ne realiĝis. La unua eŭropa konferenco pri lingvoj, kiun la ministerio mem estis antaŭvidinta en la itala sesmonata EU-prezidanteco, titolita "Komunikado kaj lingvoj en 25-membra Eŭropo", ne okazis.

Intertempe, rilate al la afero, la deputito Alessandro Maran starigis oficialan skriban demandon al la ministrino pri instruado Leticia Morati. Maran indignis pro la agado de la ministrino. La kampanjo por la okazigo de eŭropa konferenco pri lingvoj pludaŭras per faksoj, leteroj kaj interretaj subskriboj. Legu pli kaj partoprenu ĉe: http://lingvo.org/bulteno.

*Dafydd ap Fergus en [esp-inform]*

# Centjara datreveno en Londono

La 26-an de aprilo 2003 la Londona Esperanto-Klubo festis sian centjaran datrevenon, kaj mi estis invitita kiel honora gasto. Ĉeestis multaj esperantistoj, ĵurnalistoj kaj aliaj gastoj. La bela festo okazis en la Londona Universitato, kie Prof. D-ro John Wells tre interese parolis pri la historio de la Klubo, kaj la alia honora gasto, D-ro Marjorie Boulton, deklamis sian belan poemon, kiun mi sube prezentas. Mi mem salutis la Klubon kaj – laŭ deziroj – donacis al ĝi belan, grandan foton de Ivo Lapenna, mia edzo, kaj du kompaktdiskojn kun kvar liaj paroladoj kaj prelegoj – tri estas la lastaj de Ivo Lapenna, eldiritaj dum la Internacia Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz, 1987: "100 Jaroj de Esperanto-Kulturo", kaj unu eldirita en Nürnberg: "Lingva Diskriminacio", 1964.

Ni bele bankedis en la luksa restoracio de la Universitato kaj ĝuis la kunestadon.

La Londona Esperanto-Klubo estas io tute speciala. En ĝi regas tiel bona atmosfero pro la reciproka lojaleco kaj amikeco inter la membroj kaj pro la varma malfermiteco al la gastoj.

Mi deziras diri, ke mi multe ĝojis denove esti inter ĉiuj miaj geamikoj de miaj londonaj jaroj...

*Birthe Lapenna*



**Por la centjara festo de la Londona Esperanto-Klubo**
la 26-an de aprilo 2003
de **D-ro Marjorie Boulton**

Hodiaŭ ni festas. Ni festas jarcenton;
ni festu fiere kaj fide;
ni festu dediĉon, la dev-diligenton,
ni festu laŭ veroj, valide.
Cent jarojn persistis la
klub' en Londono,
per longaj laboroj, per multa sindono;
malgranda, mokebla, kaj minoritata,
ĝi daŭras, areto gefrata.

Ni festu per vortoj, ni festu per ritoj
pri klubo varmkore multrasa;
jen fremdaj studentoj,
kaj jen ekzilitoj,
jen kamaradeco senklasa.
Jen kursoj, prelegoj
kaj monda kulturo,
bultenoj kaj kantoj kaj literaturo;
pri la lingva miraklo ni daŭre atestu;
post jarcento, hodiaŭ ni festu.

Pioniroj persistis, aferoj progresis,
kaj multaj servintoj jam mortis;
en mondo neanta, defie ni jesis
kaj kontraŭ probabloj ni fortis.
Strebadis malmultaj,
grupet' ŝajne febla,
kaj pruvas maleblon praktike tre ebla;
hodiaŭ al mondo ekstera ni gestu
defie, hodiaŭ ni festu.

Ne eblas sumigi la multajn sindonojn
plej ofte en preskaŭ silento,
de homoj solvintaj
la multajn bezonojn,
gvidinte nin tra la jarcento,
sed hodiaŭ ni pensu pri ili kaj danku,
esperu ke tiaj future ne manku;
dum la dua jarcento sindono plu restu;
dankeme, hodiaŭ ni festu.

Eĉ rapide rigardi pasintajn
programojn
registras mirindajn diversojn:
vojaĝojn, amuzojn, lumbildojn,
deklamojn,
diskutojn, sciencojn aŭ versojn.
Sed apud frandadoj de scio kaj belo
flagretas lumige la pli alta celo;
ke amo, libero kaj paco pli estu:
hodiaŭ ni festu.

Hodiaŭ ni festu fiere kaj ĝoje;
sed morgaŭ ni ree laboru;
hodiaŭ ni festu, paŭzante survoje,
sed morgaŭ por streboj fervoru;
memoroj, honoroj
kaj gloroj nun ravas,
sed la dua jarcento
nun daŭre pli gravas;
ni nin rededIĉu, fidelu kaj ardu,
kaj morgaŭ, antaŭen rigardu!

# Pri membriĝo en UEA kaj TEJO

Kutime esperantisto estas membro de siaj loka kaj landa organizaĵoj kaj kunlaboras kun ili. Sed, post tio, oni povas aldoni internacian elementon al sia Esperanto-vivo. Tiucele oni povas fariĝi individua membro de UEA aŭ de ĝia junulara sekcio TEJO. Kiel membro vi subtenas la laboron por Esperanto je internacia nivelo kaj vi estas informata pri internaciaj okazaĵoj kaj iniciatoj.

Universala Esperanto-Asocio estis fondita la 28-an de aprilo 1908. Ĝi celas, laŭ la statuto de 1980:

a) divastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto;
b) agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;
c) plifaciligi ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;
ĉ) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidaro, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

Por atingi siajn celojn, UEA laboras per kunordigo de la diversaj Esperanto-asocioj, studoj kaj esploroj, publikigo de libroj kaj aliaj eldonaĵoj, informa agado servoj al la parolantoj de Esperanto, okazigo de kongresoj kaj konferencoj, kunlaboro kun aliaj similcelaj asocioj, kaj apliko de aliaj jure permesitaj rimedoj, kiuj proksimigas la celojn de UEA.

## Membraro de UEA

UEA havas aligitajn kaj individuajn membrojn. La aligitaj membroj estas tiuj membroj de aliĝintaj Landaj Asocioj, kiuj ne estas inviduaj membroj de UEA. DEA aliĝis al UEA en 1933. Por la aligitaj membroj DEA pagas po unu eŭron jare. La individuaj membroj de UEA pagas mem jaran aŭ dumvivan kotizon. En 2002 estis en Danio 136 aligitaj membroj kaj 79 individuaj membroj, el kiuj 15 estis dumvivaj membroj. La individuaj membroj de UEA, malpli ol 30-jaraj, estas samtempe individuaj membroj de ĝia junulara sekcio, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. En 2002 estis en Danio tri membroj kan unu dumviva patrono de TEJO.

Ĉar DEA estas aliĝinta asocio de UEA, ĝi havas reprezentanton en la Komitato de UEA (tiel nomatan komitatanon A). La Komitato estas la supera organo de UEA. Ĝi kunsidas ĉiujare dum al Universala Kongreso kaj laboras perpoŝte dum la cetero de la jaro. La dana komitatano A estas nia prezidantino Ileana Schrøder. La mandato de la nuna komitato daŭros ĝis julio 2004.

## Malkresko en la membraro

Dum kelkaj jaroj la membraro de UEA malkreskis en ambaŭ kategorioj, tiu de aligitaj membroj kaj tiu de individuaj membroj:

Mondo:

| Jaro | Aligitaj | Individuaj | Sume |
|---|---|---|---|
| 1998 | 12.782 | 7.359 | 20.141 |
| 2002 | 12.173 | 5.657 | 17.830 |
| (Procenta kresko) | (-4,8%) | (-23,1%) | (-11,5%) |

Danio :

| Jaro | Aligitaj | Individuaj | Sume |
|---|---|---|---|
| 1998 | 131 | 93 | 224 |
| 2002 | 136 | 79 | 215 |
| (Procenta kresko) | (+3,8%) | (-15,1%) | (-4,0%) |

Dum la kvin pasintaj jaroj la proporcia malkresko en Danio estis malpli granda ol la meznombra malkresko de la tuta membraro de UEA. La proporcia aro de individuaj membroj estas pli granda en Danio ol la meznombra proporcio en la tuta membraro

UEA havas dificiton en la bilanco, kaj laŭtakse UEA bezonas 8000 individuajn membrojn por ekhavi ekvilibron en la ekonomio. Kompare al la nuntempa membraro 5657, tio estus kresko de 41% de la nombro de individuaj membroj.

Ĉu en Danio ni kapablas altigi je 41% la membraron de indviduaj membroj de UEA? Tio signifus 32 novajn individuajn membrojn.

Ĉu vi mem emas subteni la laboron por Esperanto je internacia nivelo kaj esti informata pri internaciaj okazaĵoj kaj iniciatoj?

Vi povas aliĝi al UEA per ĝia hejmpaĝo www.uea.org aŭ per ĝia ĉefdelegito en Danio: Bent Wiinberg, Nældebjerg Alle 30, 2670 Greve. Telefono 43 90 42 01. Retadreso: teo@post11.tele.dk. Ĝirkonto 1001 9621.

### Kiom kostas membreco en UEA dum 2004?

| Kategorio | Prezo en danaj kronoj | Klarigo |
|---|---|---|
| MG | 65 | Individua membro, kiu ricevas nur la *Gvidlibron tra la Esperanto-movado.* |
| MJ | 160 | Individua membro, kiu ricevas la *Jarlibron.* |
| MA | 400 | Individua membro, kiu ricevas la *Jarlibron* kaj la revuon *Esperanto.* |
| DMJ | 4 000 | Dumviva membro, kiu ricevas dumvive la *Jarlibron.* |
| DM | 10 000 | Dumviva membro, kiu ricevas dumvive la *Jarlibron* kaj la revuon *Esperanto.* |

Ĝis la aĝo de 29 jaroj, en la kategorioj MA, MJ kaj DM, oni ricevas ankaŭ la revuojn de TEJO.

## La 6a EEU-kongreso en Bilbao 2004

La Europa Esperanto Unio (EEU) aranĝas sian 6an kongreson en Bilbao 25-29 aŭgusto 2004. EEU estas financata de la aliĝintaj landaj asocioj. DEA tiel pagas 0,5 eurojn po membro de DEA.

La programon kaj aliĝilon vi povas trovi en jena retpaĝo: http://geocities.com/esperantobilbao/. Se vi ne havas aliron al la interreto, Bent Wiinberg povas sendi aliĝilon al vi.

**KONGRESKOTIZOJ**

| | Ĝis 2003/12/31 | | Ĝis 2004/04/30 | | Post 2004/05/01 | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Kategorioj | Eŭroj | DKK | Eŭroj | DKK | Eŭroj | DKK |
| 1 | 50 | 380 | 60 | 455 | 70 | 530 |
| 2 | 35 | 265 | 40 | 305 | 45 | 340 |
| 3 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 |

1) Individua kongresano
2) Kunulo (Tiu, kiu loĝas samadrese kun aliĝinto, kiu pagas kotizon en 1) aŭ Junulo (Tiu, kiu naskiĝis post 1974/12/31)
3) Infano (Tiu, kiu naskiĝis post 1990/12/31)

**RIMARKOJ**:

1) La koncernan kotizon vi povas sendi al konto nro. 2095-0141-45-2218001832, de la ŝparkaso Bilbao Bizkaia Kutxa (BBK).
IBAN: ES51 2095 0141 4522 1800 1832
BIC: BASKES2BXXX
2) Konstanta adreso: Grupo Esperantista (EEU-Kongreso)
Barrencalle Barrena, 7-1 Dcha
48005-BILBAO
HISPANIO
Telefona nro.: 34-944164492 (Vendrede, 19.30–21.00 h. Aŭtomata respondilo). Portebla tel.: 34-696613958.
Retadreso: esperantobilbao@terra.com
3) La kotizo ne estos repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenas la kongreson.
4) La aliĝilon oni pritraktos nur post ricevo de la koncerna pago.
5) Alie vi povas sendi la kotizon al la dana poŝtkonto 10019621 kaj samtempe la aliĝilon al la dana peranto:
Bent Wiinberg, Nældebjerg Alle 30, 2670 Greve.

# Esperanta Printempo en Pollando

La Krakova Esperanto-klubo UNESCO kutime organizadas siajn "Printempajn Tagojn" en Krakovo aŭ ties ĉirkaŭaĵo. Ĉi-jare de la 28a de aprilo ĝis la 4a de majo oni okazigis ĝin sude de Krakovo en la bela kaj fama kuracloko Krynica, proksime al la slovaka landlimo. Ĝia minrinda situo en valo ĉirkaŭata de la Beskidaj montoj kreas neimageblan pejzaĝon.

Kiel kuracloko ĝi havas pli ol 150-jaran historion. Al Krynica alvenas miloj da pacientoj kaj ripozantoj el tuta Pollando kaj eksterlando por ripozi aŭ kuracigi sin en la diversaj banejoj depende de malsano.

El sep fontoj ĉi tie eblas trinki iu ajn akvon kiu plej efike taŭgas kontraŭ diversaj malsanoj. Krynica havas 15.000 loĝantojn kaj aspektas kiel trankvila loko, ideala por ripozo. Tamen dum la somero la loĝantaro multobliĝas pro invado de pacientoj kiuj alvenas al la sanatorioj. En la sezono oni bele dekoracias la urbon. Precipe ĉarme aspektas somere floraj tapiŝoj kaj nekutime komponitaj oraj flor-krucoj kaj birdoj .

Mi tie estis printempe, kiam ankaŭ alte sur la montoj (ĉirkaŭ 1000 m.) kuŝis kaj degelis neĝo. Sed cirkaŭ la suba promenejo verdiĝis la herbejo kaj feliĉe brilis hela varma suno. En Krynica ĉiuj ripozlokoj kaj sanatorioj estas konvene dislokitaj, oni povas facile ilin atingi piede aŭ per la loka buso.

Meze tra la urbo trapasas promenejo. Flanke de ĝi troviĝas ŝlim-banejo kaj mineralbanejo. Aliflanke estas granda, moderna trinkejo kun ĉiuspecaj akvoj. En la trinkejo oni povas admiri plantojn kiel palmojn kaj aliajn. Tie ankaŭ funkcias koncerta salono. Dum kvin tagoj semajne ludas kuracloka orkestro. Antaŭ la trinkejo troviĝas koncerta konko. Ĉiutage kiam mi tie estis, ludis loka orkestro.Foje eĉ prezentiĝis slovaka ensemblo el Bardejov. Ĉe la rivereto-torento Kryniczanka estas vilao "Romanowka", muzeo de Nikifor, loka artpentristo.

Antaŭ ses jaroj oni konstruis en Krynica kablovagonaron, longan je 2,2 km. Laŭdire ĝi estas la plej longa de Eŭropo. Post tri jaroj oni

plilongigos ĝin ĝis kvar kilometroj. Apud la kablovagonaro ekzistas kvin skitreniloj uzataj dum vintro. Ili situas proksime de Krynica. Ili trenas skiantojn supren ĝis la pinto, ĉirkaŭ 1000 metrojn.

La ĉi-jaran renkontiĝon vizitis nur 12 esperantistoj: naŭ el Pollando, du el Germanio kaj unu el Danio. La programo estis diversspeca. Ĉiutage okazis konversacia rondo. La liberan tempon iuj uzis por grimpi al la Parka Monto (6oo m.), aŭ veturi per montgondoleto al Jaworzyna-monto (1100 m.).

La kotizo por unu tagnokto estis 60 danaj kronoj inkluzive tuttagan mangaĵon. Por amantoj de vintraj sportoj estas preferinda glacisledo longa je 1 km. Do elektu mem kion vi atendas travivi tie.

*Eugeniusz Rybarczyk*

# Impresoj pri BET-39

La ĉi-jaran Balta Esperanto-Tendaro okazis laŭvice en Tartu, Estonio. Partoprenis 80 esperantistoj el 8 landoj: 40 el Estonio, 14 el Latvio, 13 el Finnlando, 4 el Litovio, 3 el Pollando, 3 el Germanio, 2 el Belorusio kaj 1 el Danio. Ukrainanoj kaj Rusoj ne partoprenis pro neakiro de vizoj. Kiel kongresejon oni uzis grandan mezlernejon situitan en konvena trafiknodo. Ĝi estis atingebia de multaj direktoj en la urbo kie estis dislokitaj la esperantistoj. Mia loĝejo estis studenta hejmo. La tarifo por unu tagnokto estis 75 danaj kronoj.

La lokaj esperantistoj estis preparintaj riĉan programon, kiu precipe konsistis el prelegoj pri la aktuala situacio de la apudbaltaj landoj kaj ilia membriĝo al EU. Oni diskutis ankaŭ ĉu konvenus disvastigi la BET-agadon al aliaj Baltmaraj nacioj aŭ ne. Nuntempe ili volas ne tuŝi tiun aferon. Eble post la membriĝo ili ŝanĝos sian opinion. Okazis ankaŭ kelkaj interesaj prelegoj pri historio de la urbo Tartu, kiu havas riĉan historion de svedaj, polaj, germanaj kaj rusaj okupaciantoj ĝis la nuntempa libera ŝtato.

Plej interesa por mi estis urba ekskurso, kiun gvidis unu esperantisto loĝanta en Tartu. Mi ekvidis kelkajn vidindaĵojn ligitajn profunde kun la urba evoluo. Ekzemple la sveda reĝo

Gustavo la 2a detruis la urbon en 1602, sed post tiu ruinigo li konstruis la urban universitaton. Monumento de li staras apud la universitato. En la 16-a jarcento la suda parto de Estonio apartenis al Pollando. La pola reĝo Stefan Batory donacis al la urbodomo de Tartu polan standardon, kaj tiu standardo kune kun la estona estas videblaj sur la frontono de la urbodomo. Tria interesa vidindaĵo estas memortabulo omaĝe al la unua prezidento de la Ĉeĉena Respubliko Ĝoharjev Dudajev, kiu loĝis tie dum la periodo 1987-1991. Kompreneble tiutempe li agis kiel rusa generalo.

En Tartu loĝas 100.000, plejparte estonoj. Nur malgranda procento estas alinacianoj. La urbon trafluas rivero Emajogi, ĉe kiu troviĝas granda parko, bona ripozloko por la urbanoj. La venonta BET-40 okazos en Kretinga en Litovio. Bonvenon!

*Eugenius Rybarczyk*

# Pasporta Servo



Pasporta Servo (PS) estas adresaro de esperantistoj kiuj pretas senpage gastigi (tamen ne nepre manĝigi) aliajn esperantistojn dum kelkaj tagoj. Kiel dana kunordiganto de PS mi instigas ĉiujn danajn esperanto-parolantojn pripensi, ĉu ne estus bona ideo aliĝi al ĝi kiel gastiganto. PS donas bonan imagon pri la disvastiĝo de Esperanto en la tuta mondo.

Oni deziras plilarĝigi la gastigantaron en la venontjara eldono. Esti gastiganto ne estas granda tasko, kaj vi certe havos bonajn travivaĵojn kun eksterlandaj esperanto-amikoj. Dum vi estas gastiganto vi ankaŭ mem ricevas ĉiujare senpagan ekzempleron de PS.

Aliĝilo haveblas ĉe: Bent Holm, Haslevangsvej 30, 8210 Århus V. Retpoŝto: pasporto@teamholm.dk, telefono: 4027 3451.

*Bent Holm*

# Anonco



## Invito al Zamenhof-vespero

La Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo (KEKG) invitas vin al Zamenhof-vespero, sabaton la 13-an de decembro 2004, (Lucia tago) je la horo 19.30 ĝis 23.00 en Frederiksberg Medborgerhus, Danasvej 30 B, salono n-ro 1, dua etaĝo.

## *Programo*

1. **Torben Svendsen:** *Bonvenigo* je 19.30 horo.
2. **Mogens Rude Andersen**: *Mia 5064-a esperantista tago – renkontiĝo kun japana kulturo* (20 min).
3. **Maria Henriksen**: *Deklamado de propraj poemoj* (10 min).

* Pauzo – manĝaĵo kaj trinkaĵo (30 min).

4. **Jonas kaj Mathias Dalmose**: *Irlanda muziko* (35 min). Tre sukcese ili ludis la muzikon dum la UK en Gotenburgo.
5. Ebleco por spontanea parolado aŭ deklamo (10 min).
6. **Ujutna interbabilado** kaj daŭrigo de la muziko.

* Fino de la programo je 22.40 horo.

Ni esperas, ke vi aliĝos kiel eble plej baldaŭ al inspira kaj ujutna vespero. Ni povos regali vin per: sandviĉoj, teo, kafo, klementinoj, ĉokolado, glaso da vino kaj kukoj je la prezo de **50 kr. por persono**. Bv. aliĝi kiel eble plej baldaŭ – aŭ plej malfrue sabaton, la 7-an de decembro 2003 al:

**Torben Svendsen: Tel. 38 74 97 64, rete: tsv@vip.cybercity.dk**.

La Kulturgrupo deziras al vi Ĝojan Kristnaskon kaj Feliĉan Novan Jaron 2004! Ĝis la revido denove, merkredon la 14-an de januaro 2004, al nova aranĝo en la Esperanto-kulturgrupo.

Kore salutas

**Lis Thune, Eugeniusz Rybarczyk kaj Torben Svendsen**

# Salutoj

## – de la partoprenantoj de la Semajnfina kurso en Ruds Vedby, 10-12. de oktobro 2003:

Nova iniciato.
Grupo da esperantistoj je daŭriga nivelo kunvenis en la bieno – vere mirinda kursejo – de Anna kaj Erik, meze de Selando. La loko estas simple perfekta, kaj kun Lars Forsman kiel instruisto ni certe estis privilegiuloj. Ni interparolis, solvis taskojn, lernis neologismojn.
Mi proponas ke ĉi tiu iniciato iĝu tradicio. Dankon al Anna, Erik, Lars & Lars kaj al DEA.

*Arne Casper, Østerbro*

---

Mi kun plezuro venis al Ruds Vedby por kune kun afablaj partoprenantoj fari kurson konversacian. Specialan dankon ni donu al la gastigantoj Anna kaj Erik, kiuj kreis veran Esperantujon dum la semajnfino. Mi volonte partoprenos en similaj kursoj estonte.

*Lars Forsman, instruisto, Karlskoga, Svedio*

---

Tre bonan kurson ni havis dum la semajnfino. Egan dankon al Anna kaj Erik Hansen, Ruds Vedby, kaj al Lars Forsman, kiu venis el Svedio por instrui nin.

*Liss-Lotte Talbro, Odense*

---

En bela, ujutna, varma domo ĉe Anna kaj Erik ni, dek esperantistoj kaj la instruisto Lars Forsman, laboris kun Esperanto la tutan tempon, kiam ni ne ĝuis la delikatajn manĝaĵojn de Anna.
Estis lernriĉaj kaj inspiraj tagoj kaj ankaŭ estis tempon por promeni en la arbaro kaj ĝui la puran aeron kaj la belajn aŭtunajn kolorojn.

*Edel Hanehøj, Taastrup*

---

Bona kurso estas kie oni laboras, festas kaj interparolas pri grandaj kaj malgrandaj aferoj. Ĉi tiu kurso estis bona laŭ miaj kriterioj. Ni ankaŭ renkontis varmajn kaj bonhumorajn gegastigantojn kaj interesajn samideanojn. Kun moderna esprimo: kurso kiu faras diferencon.

*Gert Rønsby, Holbæk*

---

Grave estis havi instruiston el ekster Danio – por havi ion krom krokodilaj hejmecaj frazoj kaj banalaj konsentoj. Por paroli Esperanton kaj verŝi lumon sur kaj pri kreskemo. Koran dankon! - kaj ĝis kursrevido.

*Zofia Trianra-Tyshøy, Allingåbro*

---

Estis tre interese por ni partopreni la Esperantan kurson ĉi tie en nia hejmo. Ni esperas ke venos pli da aŭtunaj kursoj en nia hejmo kun same bonaj kunlernantoj kaj prezice kun Lars Forsman, ĉar ni ŝatas lerni pli da Esperanto.

*Anna kaj Erik Hansen, Ruds Vedby*